



# PENSEO

*N-ro 255*

*jan. / 2013*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 24-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Anteo (Ĉinujo)



# Ĉio eblas

aŭto trapasas tunelon virgan.  
 la ŝtonplena monto estas pli mola ol akvo.  
 infanoj nekonataj svarmas en la vilaĝeto,  
 kie mi naskiĝis antaŭ kvindek jaroj.  
 la gekunuloj de la infaneco restas junaj kiel  
 miaj idoj;  
 la tempo tie estas verda.  
 knabineto sin ekĵetas kvazaŭ amatino  
 sur mian bruston ardan pro impulso  
 kaj ŝia kolo min sufokas.  
 mia edzino gapas al ni,  
 kun mieno tondre trafita.  
 la knabineto estas ja ŝia filino,  
 kiun sed ne mi naskigis.  
 ĉe sunsubiro mi fotas patrinojn  
 kun sia bebo suĉanta mamojn.  
 matenruĝo kaj bovaro  
 sin trudas en la scenon varman.  
 mia patrino dudek jarojn pli juna ol mi  
 iras al mi, subtenante mian patron jam  
 centjaran.  
 kio misordigis la generaciojn?  
 la homaro nun naskiĝas malvirga kaj trompa.



## Leieladonna (Meksikio)



# El malproksime

Mi ne havas bluajn okulojn...  
 neĝan haŭton...  
 sed brunan haŭton  
 kaj samkolorajn okulojn...  
 sed ne gravas; kara mia,  
 ne gravas miaj okuloj;  
 ili estu kaf-koloraj  
 oni devas, eble;  
 ke ĉiame trarigardis  
 la brunajn montojn  
 serĉante vin...  
 do; ne gravas por vi...

la koloro de miaj okuloj...

sed gravas por vi kio ili vidas:  
Vi... kara mia...

Mi ne havas neĝan haŭton,  
 mi estas brunhaŭta,  
 sed vidu la koloron de mia animo,  
 ĝi ne estas tiel bruna...

Eble...

mi ne havas kristalan rideton...

sed...

mi ridetos pro kaj por vi...  
 Ni kuniĝos feliĉaj,

blanka kaj bruna haŭtoj,  
 bluaj kaj karkoloraj okuloj,  
 nia kuna rideto forigos la solecon.

El pado dum nokto...  
 amato; mi alvenos en revoj,  
 mi amos vin, mi restos ĉe vi.  
 karulo el mia koro;  
 amato suno; mi revas...  
 plenumi tiun songon,  
 por atingi vin...  
 baldaŭ, en songo,  
 dezirema kaj sopira...

Suprenrigardante,  
 kuŝanta sur mia lito mi ridetas...  
 kaj imagas belan revon...  
 mense mi vidas viajn bluajn okulojn,  
 vian belan rideton,  
 vian blankan haŭton...



### Helena Tylipska (Italujo)



## Hajko por la festoj

Bril' de l' abio  
 lumplenigas la ĉambron;  
 ja, for—glacio.

Senhejma la ul'  
 streĉita pro malvarmo  
 vagas sen plezur'

La ĉifon-vesto  
 kovras magran figuron:  
 ĝin fest' forestos.

Eble teleron  
 de sup' iu donacos  
 en ĉi vespero.

Lum' de kandelo  
 ŝtelita en preĝejo,  
 donos hel-eron.



### Paŭlo Silas (Brazilo)



## Ĉu atingi perfektecon per perfido?

Judasa malnova manovro.  
 Kontraŭa militofront' estas.  
 Perfidas per kis' filozofo.  
 Denove la temp' en mond' eta.

La sinpendiginto per lang' aŭ  
 Per filozofioj sufokaj.  
 Preleg' 30-foje nun ankaŭ  
 Sin trompas per tonoj allogaj.

Li ĵuras, ke konas nenium,  
 Se kokokriado lin trafas.  
 Mi songis. Vi apelaciu.

Sed kulpon de Pilat' ellavas  
 La sang' propravole verŝita.  
 El ĉiuj, nenio laŭdinda.



## Siv Burell (Svedio)



# La tempo

Tago malaperas  
jaro foriras  
tasko estas finfarita  
pliaj restas.

Pensu pli longe ol por la tago  
havu grandajn perspektivojn!

Se ne sufiĉas la tempo  
pensu ke troviĝas multaj vivoj.

## Petro Palivoda (Ukrainio)

# ili estas simple floroj

kaj tiel malperfektaj  
ili ne scipovas ion fari  
nur donaci ĝojon  
ili bezonas milionojn da jaroj  
por trapasi ŝtupojn de evolucio  
penatingi pintojn de perfekte  
trompi perfidi kaj murdi  
al si similajn  
do iĝi homoj

# Poezio

trovi tiujn unikajn vortojn  
por ke ili bruligu fajron  
al devojiĝintoj  
kaj invitu ĉe tablon  
mortantajn pro malsato  
kaj ĉiuj aliaj vortoj  
estas simple susuro  
de truhava tamburo  
fajfeganta pro vento

\*\*\*

belega estas vivo  
premiĝos koro

pro doloro  
malvarma vento  
blovestingas revojn  
fariĝos por eterne  
nokt' malluma  
finbrulas suno  
kaj kandelo  
ridetas vi  
belega estas vivo

# Maro

mi staris ĉe maro kaj pensis  
ke ĝi estas viva estaĵo  
ke ni ĉiuj venis el maro  
ke nia ekzisto finiĝos  
sed maro ja estis kaj estos  
senmorta simile al amo  
mi nomon amatan  
gravuris sursable  
ne povis ĝin ondoj forlavi  
kaj falis steleroj en maro



## Dimitrije Janicic (Serbujo)



# Larmo de junulino

*En proksimeco de Lukovska Banloko, sur krutaĵoj de Kopaonik (Serbio) ekzistas fonto el kiu fluadas nur guto po guto de akvo, kiel larmoj. Sciencistoj racie klarigis ĉi tiujn okazaĵojn, sed popola legendo estas pli bela – legendo pri eterna amo.*

I

*Ho, junulino  
de nekonata deveno,  
el profundo de tempo,*

*el malhelo de jarcentoj,  
el perdita pasinteco,  
junulino – mesaĝo,  
monumento  
por eterna amo*

### TEMPO DE FABELOJ

Estis tempo de fabeloj,  
tempo de reĝoj,  
niaj prapatrinoj  
trikapaj drakoj  
dum tero maturiĝas,  
dum gigantoj  
kurpelis feinojn  
kaj ili fuĝadis  
kriante  
tra Kopaoniko.  
Vivon akompanis  
magio kiel scienco,  
mirakloj estis  
realo.  
kaj tempo de fabeloj  
vereco.

2

### JUNULINO MILICA

Estis la junulino,  
bela kiel ĝojo,  
belega paŝtistino:  
haŭton bronzkoloran  
donis al ŝi montara suno,  
lavis ŝin varmaj fontoj,  
zorgis pri ŝi pura naturo  
el tempo de fabeloj.  
Junulino – timema kapreolo,  
de harmonia paŝo,  
arda rigardo,  
okuloj nigraj,  
kiuj aŭroron malfermas,  
kron varmiĝas,  
racion detruas,  
kun voĉo kies beleco  
derompis pepadon de birdoj,  
hurlon de bestaro,  
unuiĝinta kun naturo  
inter abioj, en fagejoj,

lavis vizaĝon per varmego  
de sennombraj fontoj  
kiujn tero donis al ŝi,  
per akvo kiu likvigis neĝon,  
klarigadis okulojn  
kuracadis ostojn.  
Estis la junulino  
en tempo de fabeloj  
bela kiel fabelo.

3

### DEZIRO

Amo ne doniĝas  
kaj ne preniĝas,  
ĝi nur deziras  
realiĝi,  
ĝi sufiĉas  
al si sola.

Deziro, freneza deziro.  
pli varma ol subtero varmega,  
pli forta ol tempestoj aŭtunaj  
kaj ventegoj vintraj,  
pli freneza ol ludoj de kapreoloj,  
pli bela ol montaraj aŭroroj,  
kreskadis,  
ŝvelis,  
postuladis,  
petadis,  
rompantis.

(daŭrigota)



### Cezar (Germanujo)



Ek! La kristnaskarbon for!

Ekhurligu la sirenojn,  
knalu, kraku, kun furor'!  
Mi sopiras novajn scenojn.  
Kristnaskarboj estu for!

Estu for la arbokliŝoj:  
 Arĝentstrioj, kugloj, lum'!  
 For la pingloj de l' tapiŝoj,  
 for la piramid' kun fum'!

Finon al kviet', manĝemo!  
 La sobrec' - jen vera fest'!  
 La botelojn for de l' hejmo -  
 kristnaskfestoj estas pest'.

Kaj neniam plu mi diru:  
 Venu, ho, Jesuĉjo, min.  
 Mi prefere morten iru  
 ol al buĉfest' kun inklin'.  
 Mi ne preĝu plu kun petoj  
 al la Sankta Virgulin'.  
 Ĉe l' eksplodoj de l' raketoj  
 sentis mi - vent' turnis sin!

Mi neniam plu ekrevu!  
 Malutilis la fervor'.  
 Mi ribelu kaj min levu:  
 Ek! La kristnaskarbon for!



## Yi Zhao (Ĉinujo)

### Ho kajto, mia kajto

*al s-ro Josip Pleadin*  
 ho, kien vi flugas kajto  
 al kiu blanka nuboj  
 al kiu mistera celo  
 ho kajto, mia kajto

kie liber' senŝnura  
 senbrida flugorajto  
 por via valsbalanco  
 en puŝa ventoza pel'

ĉu vi nun audas  
 pri la flugpaŝ-son'  
 kun printempa venteto  
 ho kajto, mia kajto

tra la ĉiela Kroatio  
 per forta magia  
 venas kuraĝo  
 ho, kajto mia kajto

ho kajto, mia kajto  
 tra la montsupero  
 tra la marpenetraĵo  
 flugu, flugu al Ĉinio

ho kajto, mia kajto  
 ĉitie estas milda vento  
 kaj varma suno  
 flugu, flugu al Ĉinio

flugu, flugu al Ĉinio  
 ho kajto, mia kajto  
 per mia junkoro  
 por via sukceso...



## Mo Yan (1955—)

### La virino

Mia pliaĝa frato alportis per mulo hejmen morna-mienan junan virinon, kies du brovoj preskaŭ linie kunligiĝis super ŝiaj peĉnigraj okuloj. Li diris al mi: "Fraĉjo, la virino estas nia komuna edzino. La bebo, kiun ŝi naskos, estos nia komuna infano."

Tiam mi aĝis nur 16 jarojn. Je ekvido de virino, mia vizaĝo tuj ruĝiĝis pro hontemo. Mia frato iris kolekti brullignojn en la monto,

lasante min kaj ŝin ambaŭ resti en la hejmo. Ŝi ellernigis al mi kiel kuŝi kun ŝi en la lito, el kio mi sciigis, ke kuŝado kun virino estas la plej bela afero en la mondo. Ekde tiam, mi konsideris ŝin kiel mian karulinon en la koro, kaj diris al ŝi ĉion, kion mi volis diri. Mi serioze aŭskultis ĉion, kion ŝi diris al mi, kaj neniam malŝatis ŝian babilemon, rigardante ŝiajn okulojn kaj karesante ŝiajn manojn. Poste, mia frato estis mordemortigita de lupoj, kaj ŝi fariĝis mia propra virino. En la tria tago post la morto de la frato, mi volis kuŝi kun ŝi, ŝi diris, ke ni ne povas fari tion. Sed en la kvara nokto, kiam la luno leviĝis, karesante mian manon en mallumo, ŝi diris: "Ni faru tion." Mi demandis ŝin: "Vi diris, ke ni ne povas fari tion, ĉu ne?" Ŝi diris: "Hieraŭ ni ne povis, sed hodiaŭ ni povas."

\**Mo Yan: Ĉina Nobel-premiito por literaturo 2012.*

*elĉinigis*



**Zhang Xuesong (Ĉinujo)**

**Alain Souchon (1944—)**



Vidi sub jupoj

Retin' kaj pupil'  
 El l'knabaj okuloj 'stas bril'  
 Por insida lud'  
 Vidi l'jupojn de sub,  
 Kaj l'viva plena, tut-  
 Sorbita de ĉi afer',  
 De l'insida lud':  
 Vidi l'jupojn de sub.  
 Ili, fier',  
 Alt' sur ŝtuparet', aer',  
 Malestima rigard', lasas al l'vento far',  
 Ili, en dolĉ'  
 Pri l'vira malfort', scias ja

Ĉio, kio turniĝas sur ter',  
 'Stas la robaj leĝer'.

Multaj per klopod',  
 Per kliniĝ, streb,' kolotord',  
 vid' : jen l'misfortun'  
 de vivo aĉ ! la resum'  
 Vid' : l'tuta fier',  
 Militoj, funebroj kun.  
 La morto, la bel',  
 Kantoj de somer',  
 La rev'.

Se foje ĝenitaj ili rifuzas  
 Rigardojn sur gambojn, knaboj frenezas  
 Pro ĝi.

Tiam endas falig'  
 Virojn, ĉasbestojn, bier-  
 - Ojn, soldatojn, ki-  
 - U ajn cervon, movan,  
 Trikolera fanfar'  
 Ruĝvino kaj verdrabi',  
 Honoron de l'armil'  
 Vi estos vir' mia fil'.

Ili, malfier',  
 Alt' sur ŝtuparet', aer',  
 Petega rigard', ne komprenanta pri l'tut',  
 Ili, serioz'  
 Pri l'vira malfort', scias ja  
 Ĉio kio turniĝas sur ter'  
 'Stas la robaj leĝer'. Retin' kaj pupil'  
 El l'knabaj okuloj 'stas bril'  
 Por insida lud'  
 Vidi l'jupojn de sub,  
 Kaj l'viva plena, tut' – plena tut' -  
 Sorbita de ĉi afer'  
 De l'insida lud'  
 Vidi l'jupojn de sub.  
 La, la, la, la, la...

*esperantigis*



**Roland Platteau (Francio)**

9-22/8/2012

# Ĉineske

## Vejdo (Ĉinujo)



### Novjara preĝo

—laŭ ĉinesko Pusaman\*

longe daŭras milito  
kun paca hipokrito  
de Afganio  
nun ĝis Sirio

suferis homoj  
brulfalis domoj  
ĉu tiu plago  
ĉesu sen gago?

suferojn travivis jam  
ni de tertremo, cunam'  
erupta vulkan'  
kaj ŝtorm-uragan'

okazis morto  
fuŝa malordo  
ĉu alvenu pac'  
sur ĉi tera spac'?

homojn falĉas la malsat'  
beboj krias kiel rat'  
senhelpas viroj  
zumas suspiroj

kia trista scen'  
nesavebla ĝen'  
ĉu bonos veter'  
frukt-donos la ter'?

ĉie epidemio  
frenezas kun manio  
vere senbride

murdas inside

kvazaŭ insekte  
rodas difekte  
ĉu estu l' ide'  
pri la panace'?

\*Pusaman (Budhista dancisto): ĉina fiksfirma poemo  
el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5  
silaboj kun para rimo

### Al foraj amikoj

omaĝe al 30-jariĝo de GEA

—laŭ ĉinesko Manjianghong\*

por nia cel'  
amikoj  
en la foro  
vi faris  
jam multege  
da laboro  
dum plenaj tridek jaroj  
marŝas kiel motoro  
antaŭen  
senlace kaj sen  
langvoro

jen viaj  
fervoro  
obstino  
esploro  
spronas nin plue  
ja en ĥoro  
konstrui verdan rondon  
kun persistema koro  
cele al  
egala mondo  
en gloro



\*Manjianghong: (Rivero Plenruĝa): ĉina fiksfirma  
poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 434, 344, 77,

353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo *xxa,xxa,xa,xxa* / *xa,xa,xa,xa,xxa* (*x = senrima*)

## Niuniu (Ĉinujo)

### Vintra vento

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo\*

vent'

mordadas en ĉi moment'

paŝantojn

kiel frid-serpent'

ĝi

ululas de histori'

tra stratojn

falĉas kun mani'

frid'

alportiĝas en rapid'

pikadon

obsedas sen brid'

dom'

skuiĝas kiel fantom'

knarsone

de blovanta gnom'

jam

formortis ardanta am'

solecas

li jen sen balzam'

pens'

vagas en venta intens'

vanege

pro rigora sens'

al

printempa sentimental'

sopiras

li kun kora pal'

\**Dekses-Silabo*: ĉina fikforma poemo el kvar versoj

de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo *a,a,xa* (*x=senrima*)

### Sento en vintro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

mia sent'

glacie frida

miksiĝas kun ĉagreno

tikla emo senbrida

varmo-avida

la pluvo

malsekigas min

de kapo ĝis piedoj

jame sen ajna sangvin'

nur kun kor-ruin'

tremetas

eĉ mia koro

en furioza vento

pro malvarma rigoro

pro vipa roro

dumnokte

malvarma fluo

penetras en medolon

kaj mordetas sen bruo

ĝis nokt-malfruo

rompiĝas

mia pensfadeno

en ĉi frosta vetero

revoj mortas en sveno

cerb' en malpleno

\**Sopir-al-sudo*: ĉina fikforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo *xa,xa,a* (*x=senrima*).

## Sero (Ĉinujo)

### Noa arkeo nenecesas

—laŭ ĉinesko Yexingchuan\*

ne venis la lasta tag'

finfine



pensoj en vag'  
kvietiĝas  
senribele  
ĉu decas sava ag'?

ne estos fatala plag'  
al la mond'  
tio 'stas blag'  
vekiĝu vi  
stultaj homoj  
el koŝmara imag'



*\*Yexingchuan (Nokta ŝipvojaĝo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun ses versoj de 7,34,446 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)*

## Maupassant (1850-1893)



Tio okazis al li, iun dimanĉon, post la meso. Li eliris de la preĝejo, kaj sekvis la kavan vojon, kiu rekondukis lin hejmen, kiam li sin trovis malantaŭ la Martena, kiu revenis hejmen.

La patro marŝis flanke de sia filino, per grava paŝo de riĉa farmisto. Disdegnante la kitelon, li surmetis specon de virjako el griza drapo, kaj li estis kapvestita per bulĉapelo kun larĝaj randoj.

Ŝi, kunpremita en korseto, kiun ŝi laĉis nur unufoje ĉiusemajne, rekte piediris, kun la talio streĉita, la ŝultroj larĝaj, la koksoj elstaraj, anaspaŝadante iomete.

Kapvestita per florĉapelo konfekciita de ĉapelistino de Yvetot [*Iveto*], ŝi komplete

vidigis sian rondan, flekseblan, fortan nukon, kie ŝiaj malgrandaj lanugaj haroj flirtis, brunbruligitaj de la plena aero kaj la suno.

Benedikto, li vidis nur ŝian dorson; sed li bone konis ŝian vizaĝon, kvankam tamen li neniam vere rimarkis ĝin.

Kaj subite, li sin diris: "Ha vere! tamen kia bela knabino, la Martena." Li rigardis ŝin iri, admirante subite ŝin, sentante sin ekkaptita de deziro. Li ne bezonis revidi ŝian vizaĝon, ne!... Li konservis sian rigardon fikсата sur ŝia talio, ripetante al si, kiel se li parolus: "Ha vere! kia bela knabino."

La Martena dekstren turnis por eniri en "la Martenejon", la farmobienon de sia patro, Johano Marteno; kaj ŝi turnis sin posten ekrigardante malantaŭ ŝi. Ŝi ekvidis Benedikton, kiu ŝajnis al ŝi tute stranga. Ŝi kriis: "Saluton, Benedikto". Li respondis: "Saluton, la Martena, saluton, mastro Marteno", kaj li preterpasis.

Kiam li reeniris hejmen, la supo estis sur la tablo. Li sidiĝis vidalvide al sia patrino, flanke de la bienservisto kaj la braklaboristo, dum la servistino iris eltiri la cidron.

Li manĝis kelkajn kulerojn da supo, kaj forpuŝis sian teloron. La patrino demandis:

– Ĉu estas, ke vi estus malsaneta?

Li respondis:

– Ne, estas kiel iu kaĉo, kiun mi havus en la ventro, kaj kiu forigus la malsaton al mi.

Li rigardis manĝi la aliajn, tranĉante de tempo al tempo pecon da pano, kiun li malrapide alportis al siaj lipoj, kaj longe maĉis. Li pensis pri la Martena: "Tamen, kia bela knabino." Kaj diri, ke li ne rimarkis tion ĝis nun, kaj tio alvenis al li tiel, neatendite, kaj tiom intensa, ke li ne plu manĝis.

Li apenaŭ tuŝis la raguon. Lia patrino diris:

– Nu! Benedikto, vi klopodu iomete; estas de la ripo de safo, tio bonefikos al via sano. Kiam oni ne apertas, necesas fari strabadojn.

Li englutis ajnan pecon, kaj denove forpuŝis sian teleron: — ne, konstateble, tio tute ne pasis.

Posttagmeze, li iris promenadi sur la terojn, kaj forpermesis la braklaboriston, promesante deloki la bestojn dum li trapasos.

La kamparo estis vaka, pro la ripoztago. De loko al loko, en trifoliokampo, peze kuŝantaj bovinoj, kun la ventro sterniĝanta, remaĉis sub la granda suno. Maljungitaj plugiloj atendis ĉe la angulo de plugita kampo; kaj la ŝpatitaj grundoj, pretaj por la semado, disvolvis siajn larĝajn brunajn kvadratojn meze de flavaj terpecoj, kie putris la mallongaj piedoj de la tritikoj kaj la avenoj falĉitaj de nelonge.

Aŭtona vento, iom seka, balais la ebenajon, anoncante malvarmetan vesperon post la sunsubiro. Benedikto sidiĝis sur fosajon, demetis sian ĉapelon sur siajn genuojn, kiel se li bezonus konservi plenaere la kapon, kaj li laŭte prononcis, en la silento de la kamparo: "Por esti bela knabino, ŝi estas bela knabino."

Dum la vespero, en sia lito, li ankoraŭ pensis pri tio, kaj ankaŭ vekigante la postan tagon.

Li ne estis malgaja, li ne estis malkontenta; li ne sciis diri tion, kion li havis. Tio estis sento, kiu kaptis lin, io alkroĉita en lia animo, ideo kiu ne foriris, kaj faris al lia koro specon de tiklado. Iafoje dika muŝo troviĝas enfermita en ĉambro. Ni aŭdas ĝin zumante flugi, kaj tiu bruo obsedas nin, incitas nin. Subite ĝi haltas; ni forĝesis ĝin; sed subite ĝi reflugas, devigante nin restarigi la kapon. Ni povas nek ekkapti ĝin, nek forpeli ĝin, nek mortigi ĝin, nek malebligi, ke ĝi moviĝu. Apenaŭ sidinta, ĝi denove rezumas.

Nu la memoro de la Martena agitiĝis en la spirito de Benedikto, kiel malliberigita muŝo.

Poste deziro revidi ŝin ekkaptis lin, kaj li plurfoje preterpasis antaŭ la Martenejo. Fine li

ekvidis ŝin etendante tolaĵojn sur ŝnuro, fiksita inter du pomarboj.

Estis varme; ŝi surmetadis nur mallongan jupon, kaj ŝia nura ĉemizo bone desegnis la arkecon de ŝiaj lumboj, kiam ŝi levis la brakojn por alkroĉi la tukojn.

Li restis kaŭriĝanta kontraŭ la fosaĵo dum pli da unu horo, eĉ post kiam ŝi estis foririnta. Li revenis ankoraŭ pli obsedita ol antaŭe.

Dum unu monato, li havis la spiriton plenigitan de ŝi, li ekstremis kiam oni nomis ŝin antaŭ li. Li ne plu manĝis, ĉiunokte ŝvitadoj malebligis lin dormi.

Dimanĉe, dum la meso, li senĉese rigardis al ŝi. Ŝi rimarkis tion, kaj ŝi ridetis al li, pro ke ŝi estis flatata esti tiel estimata.

Nu, iun vesperon, subite, en vojo li renkontiĝis kun ŝi. Vidante lin alveni, ŝi haltis. Tiam li rekte piediris al ŝi, sufokata pro timo kaj emociego, sed ankaŭ rezoluta paroli al ŝi. Balbutante, li ekparolis:

— Vi vidas, la Martena, tio ne plu povas daŭrigi tiel.

Ŝi respondis, kiel ŝi spitis lin:

— Kio estas, tio kio ne plu povas daŭrigi, Benedikto?

Li reparolis:

— Ke mi pensas pri vi, tiom kiom estas horoj en la tago.

Metante siajn pugnojn sur siajn koksojn, ŝi replikis:

— Ne estas mi, kiu trudas vin.

Li balbutis:

— Ja, estas vi; mi havas plu nek dormadon, nek ripozon, nek malsaton, nek ion.

Ŝi tre mallaŭte prononcis:

— Tiam, kio necesas al vi por resanigi vin?

Li restis skuata, kun la brakoj pendantaj, la okuloj rondaj, la buŝo malfermita.

Ŝi frapis lin per granda manbato sur la stomakon, kaj forkuris.

De antaŭ tiu tago, ili renkontiĝis laŭlonge de la fosaĵoj, en la kavaj vojoj, aŭ noktiĝante, ĉe la rando de kampo, dum li hejmen revenis kun siaj ĉevaloj, kaj ŝi rekondukis enstalen siajn bovinojn.

Li sentis sin forportata, ĵetata al ŝi per granda impeto de sia koro kaj sia korpo. Li estus volanta brakumi ŝin, sufokpremi ŝin, manĝi ŝin, enirigi ŝin en sin. Kaj li tremetis pro impotenteco, malpacienco, pasiego, pro ke ŝi ne estis komplete al li, kvazaŭ ili farus nur unu solan estaĵon.

Pro tio, oni klaĉis en la lando. Oni eĉ diris, ke ili estis gefianĉoj. Cetere li jam demandis al ŝi, ĉu ŝi volis esti sia edzino, kaj ŝi estis respondinta: "Jes."

Ili atendis favoran okazon por paroli pri tio al siaj gepatroj.

Nu, abrupte, ŝi ne plu venis al la kutimaj renkontoj. Li eĉ ne ekvidis ŝin, kiam li spionvagis ĉirkaŭ la farmbieno. Li povis nur duonvidi ŝin, dimanĉe, dum la meso. Kaj ĝuste, iun dimanĉon, post la prediko, de supre la katedro, la parokestro anoncis, ke estis edziĝopromeso inter Viktoria-Adelaida Marteno kaj Jozefo-Izidoro Valeno.

Benedikto sentis strangaĵon en siaj manoj, kiel se tie oni eltirus lian sangon. Liaj oreloj zumis; nenion li plu aŭdis, kaj li rimarkis, post momenteto, ke li ploris en sia meslibro.

Dum unu monato li restadis en sia dormoĉambro. Poste li denove relaboris.

Sed li ne estis resaniĝinta, kaj li ĉiam pensis pri tio. Li evitis trapasi la vojojn, kiuj ĉirkaŭiris ŝian loĝejon, por ke li ne ekvidu eĉ la arbojn de la korto, tio kio devigis lin fari, matene kaj vespere, grandan ĉirkaŭiron.

Nun ŝi estis edziniĝanta kun Valeno, la pli riĉa farmisto de la kantono. Benedikto kaj li ne plu parolis sin reciproke, kvankam ili estis kamaradoj de antaŭ la infaneco.

Nu, iun vesperon, dum Benedikto pasis antaŭ la urbodomo, li eksciis, ke ŝi estis

graveda. Anstataŭ senti pri tio grandan doloron, li kontraŭe sentis kiel specon de mildigo. Tio estis finiĝinta, nun, ja finiĝinta. Ili estis plu disiĝitaj nur per la geedziĝo. Sed vere, li pli preferis tion.

Monatoj pasis, ankoraŭ monatoj. Iafaĵe li ekvidis ŝin, kiam ŝi iris al la vilaĝo per sia pezigata paŝado. Kiam ŝi vidis lin, ŝi ruĝiĝis, rigardis al la tero, kaj plirapidigis la paŝon. Kaj li deturniĝis de sia vojo, por ne renkontpasi ŝin, kaj trafi ŝian rigardon.

Sed kun teruro, li pensis, ke iun matenon li trovoĝos vidalvide kun ŝi, kaj estos ja devigata paroli kun ŝi. Tiam, kion li diros al ŝi, post ĉion, tion kion li diris al ŝi, antaŭe, tenante ŝiajn manojn, kaj kisante ŝiajn harojn apud la vangoj? Ofte li ankoraŭ pensis pri iliaj rendezuoj laŭlonge de la fosaĵoj. Estis malbela, tio kion ŝi faris, post tiom da promesoj.

Tamen, iom post iom, la aflikto forlasis sian koron; nun restis en ĝi nur la malgajeco. Kaj, iun tagon, unuafoje, li reuzis sian malnovan vojon, kiu laŭiras la farmodomon kie ŝi loĝas. De malproksime li rigardis la domtegmenton. Estis ĉi-ene! Ĉi-ene, ke ŝi vivis kun alia! La pomarboj estis florantaj, la virkoko kantis sur la sterko. La tuta loĝejo ŝajnis vaka, ĉiuj estis en la kampoj okupiĝante de la printempaj laboroj. Li haltis apud la barilo, kaj rigardis en la korton. La hundo dormis antaŭ sia hundodometo, tri bovidoj per malrapida paŝo anservice iris al la marĉeto. Dika maleagro pavis antaŭ la pordo, paradante antaŭ la kokinoj kun manieroj de kantisto sur scenejo.

Benedikto apogis sin kontraŭ piliero, kaj subite li sentis sin denove ekkaptita de ega emo plori. Sed, neatendite, li aŭdis krion, alvokan kriegon, kiu eligis el la domo. Li restis konfuza, kun la manoj kuntiriĝantaj sur la balustradeto el ligno, ĉiam aŭskultante. Alia krio, daŭranta, korŝira, enigis en liajn orelojn, en lian animon kaj en lian karnon. Estis ŝi, kiu kriis tiamaniere! Li impetis, trapasis la

